# ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

**XAVIER DEWIDEHEM**
Federacia Prezidanto
Estrarano de la Unuigo Franca por Esperanto

298 route de Neuville
FR–59250 Halluin
Tel. 06 76 03 11 56
Ret. xdewidehem@esperanto-nord.org
**www.esperanto-nord.org**

**Sinjoro Aleks Kadar**
**Prezidanto de la Unuiĝo Franca por Esperanto**
**4 *bis* rue de la Cerisaie**
**75004 Paris**

N/REF. : UK100-GEN-01
TEMO : *Kandidateco de la Nordfrancia Federacio por la Universala Kongreso de 2015 en Lillo*
KOPIO : Probal Dasgupta, prezidanto de UEA

Lillo, la 15an de decembro 2009

Estimata Prezidanto,

Universala Kongreso estas ĉiujara ĉefmomento en Esperantujo : tie renkontiĝas plej multaj esperantistoj el la tuta mondo por ĝui la plezuron konversacii internacilingve, por koniĝi unuj kun aliaj, por plikleriĝi, por debati kaj decidi pri politikoj de la Esperanto-movado, por ekkoni urbon kaj regionon kaj por distriĝi.

Universala Kongreso donas eksterordinaran impulson al la Esperanto-movadoj urba, regiona, landa. Dum nia asocia movado ofte suferas pro manko de volontuloj por responsi, agadi aŭ helpi, Universala Kongreso povas doni al homoj kaj asocioj celon kaj plian entuziasmon kaj instigi ilin al pli facila kontribuemo al la movado.

Francio rolis kaj plu rolas grave en la tutmonda Esperanto-movado. En 1997 nian landan asocion honorigis la Fyne-trofeo de UEA pro ĝia rimarkinda agado rilate informadon kaj komunikadon. Krome, norda Francio estas fama kaj aktiva regiono : fama pro ĝia esperantista historio, kiu portas i.a. la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en 1905 en Bulonjo-ĉe-Maro ; aktiva pro la ĉiujaraj aranĝoj, agadoj kaj kunlaboroj de la Nordfrancia Esperanto-Federacio kaj ĝiaj kluboj.

En 2005 la Nordfrancia Federacio kun la Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), SAT-Amikaro k.a. sukcese organizis la internacian amikecan renkontiĝon Boulogne2005 en Bulonjo-ĉe-Maro por festi la centan datrevenon de la unua Universala Kongreso.

Mi havas tiun honoron anonci al vi, ke per decido de sia komitato la 18an de oktobro 2009 **la Nordfrancia Esperanto-Federacio kandidatas por akcepti la 100an Universalan Kongreson de Esperanto en la nordfrancia ĉefurbo Lillo (Lille) kun tuttaga ekskurso en Bulonjo-ĉe-Maro**. Mi invitas vin viziti nian kandidatecan retpaĝaron : **www.lille2015.esperanto-nord.org**.

Miaj samfederacianoj kaj mi certas pri la alta intereso organizi kun UEA tiun Universalan Kongreson en Francio kaj en Lillo. Mi petas de UFE ĝian aprobon, apogon kaj partoprenon al la kandidateco de Lillo. Se UEA decidos favore al ni, certe ni tiam kapablos arigi ĉies fortojn por organizo de sukcesoplena, antaŭeniga kaj memorinda Universala Kongreso en 2015.

Antaŭdankante vin pro via konsidero, mi sendas al vi, estimata Prezidanto, mian sinceran kaj amikan saluton.

LILLE2015 espéranto Ni subtenas!

XAVIER DEWIDEHEM